# TEA-BULTENO

10$^{A}$ JARO — JULIO - AÚGUSTO 2007 — NUMEROJ 7-8


*Kion raŭpo nomas mondofino,*
*la cetera mondo nomas papilio.*
***Lao Tse***

## Kio nova en TEA?

Duona jaro jam estas for kaj tre rapide proksimiĝas la feriada tempo: tamen, momente, antaŭ ol finfine, post tiom da laborado, ripozi ĉe sunovarma, sabla marbordo aŭ serĉi puran kaj freŝan aeron sur roka pinto de monto, ni haltu kaj pripensu pri la pasinta, sesmonata agado de nia TEA.

Programoj sideje normale disvolviĝadis, se por "normale" oni intencas diri, ke la kutimaj, fidelaj personoj ĉeestis, dum ĉiuj aliaj malinteresiĝis, laŭnorme! Je ĉi punkto daŭre revenas la sama demando: kion oni atendas de ni? Nome, kion ni devus proponi, por ke homoj interesiĝu pri la programoj? Ĉu, laŭ vi, indas viziti VIAN asocion nur kiam okazas iu festado? Ĉu ne interesas vin plibonigi vian Esperanto-scion? Pli bone konatiĝi kun la historio de nia lingvo kaj ties movado? Kaj ĉu pri ĝia evoluo en la aktualaj momentoj? Ĉar fakte, ĝuste rilate ĉi tiun punkton, multo okazadas tra la mondo kio antaŭenirigas nian aferon, eĉ se pri ĉio ĉi malmultaj el ni plene konsciiĝas. Kaj tio bedaŭrindas, ĉar sciante pri la progresoj, pri la venkoj kaj, kompreneble, ankaŭ pri la malvenkoj, kiuj eble plej oftas, sed tamen ĝuste tiuj fariĝas la taŭga instru-materialo por estonta pli efika agado, oni povas pli bone propagandi, estante ĝisdatitaj pri la eventoj, oni havas pli da interesaj kaj laŭmodaj argumentoj por kontraŭrebati la kutimajn antaŭjuĝojn pri taŭgeco kaj ecoj de nia lingvo.

Nia hemeroteko, tute malmodeste dirite, estas ege riĉa kaj - ĉu vi scias? - ĉiu ajn membro de TEA povas pruntepreni sian plej ŝatatan revuon, por ĝin legi trankvile proprahejme, aŭ en *Barcola* sub la sunŝirmilego! Sur asocia breto staras MONATO, KONTAKTO, ESPERANTO de UEA kaj L'ESPERANTO de FEI, ESPERANTO AKTUELL, tre bonstila germana revuo, LITERATURA FOIRO, HEROLDO DE ESPERANTO, FOLIO DE KATAMIKARO, MEDICINA REVUO, LA GAZETO kaj multaj ankoraŭ aliaj. Estas granda elekteblo por ĉiuj gustoj, ĉu ne? Pri tio vi ne povas ne konsenti: mi ne scias, kiom da lokaj grupoj havas tiom vastan trarigardon sur la gazetara tutmonda scenejo!

Duone de junio, iu vendreda programero anoncis la temon: "Zamenhof: ĉu vi konas lin?" - mi povas certigi vin, ke la prezento de nekonataj flankoj de la vivo de nia Majstro estis vere kulture riĉiga kaj tio, kion ni aŭskultis, malkaŝis al ni aferojn kiuj finfine komprenigis al ni ĉiuj la kialojn de lia fervoro en la disvastigado de nia kara lingvo Esperanto. Miaopinie, indus ĝin reproponi, aŭ eble vi preferas, ke mi ĝin, felietone, aperigu en ĉi Bulteno? Sed poste ekestas alia pria demando: kiu certigas al mi, ke envere TEA-Bulteno estas de vi ellegita?

Bone, longa babilado komence de ĉi bulteno, eble iom teda, tiom ke vi eĉ ne finlegos ĝin. Nu, mi haltu, kaj revenu al la titolo: jes, kio nova en TEA? Ja, vi vin demandos: "pri kio nova, ŝi rakontas, se ĝis nun ŝi parolis pri trivitaj kaj gurditaj temoj?" Prave dirite! Jen al vi novaĵo, kiu, certe, stimulos vin al pli vigla aktivado ene de TEA. Temas pri estonta agado, pri kiu jam nun ni povas, eĉ devas, komenci priokupiĝi, por realigo inda.

En majo 2009 okazos en Triesto la 61$^{a}$ Kongreso de IFEF - Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. La tutmonda fervojistaro venos al nia urbo por celebri la Jubileon de tiu ĉi grava Fak-asocio. Ĝi estis fondita en Barcelono (Hispanio) la 7$^{an}$ de septembro 1909 sub la nomo de Internacia Asocio de Esperantistoj Fervojistoj: 100 jaroj pasis de tiu dato, dato ege grava kiun oni inde festos ĝuste en Triesto (*ni ja spertas pri 100-jariĝoj, ĉu ne?*). Ekde 1948, je ties postmilita refondo, ĝi estis renomita Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, kiu, sub la devizo: "LA RELOJ KUNLIGAS LA LANDOJN, ESPERANTO LA POPOLOJN", disvastigas Esperanton en la fervojista medio.

Nu, granda defio staras antaŭ ni, konsidere ke antaŭvidata estas la ĉeesto de pli ol 300 esperantistoj! Kompreneble, ĉi tiu internacia evento okazos kunlabore kun IFEF-estraro, kiun prezidas d-ro Romano Bolognesi. Jam estas konataj ĉiuj estraranoj, ĉar ili kunside laboris niasideje, fine de pasinta marto, antaŭprepare al la ĉijara Kongreso en Parizo. Planoj kaj programoj kuŝas ankoraŭ skize nur en la kapoj, sed tuj post kiam ĉio estos difinita, ni komencos agi, por ke ĝi estu kiel eble plej eksterordinare sukcesa, impona kaj memorinda.

Tiu ĉi la plej grava novaĵo rilata al nia 101-jara asocio! Ho, preskaŭ mi estis forgesonta: la kasisto rekomendis min, rememori al tiuj, kiuj, ĝis nun, ankoraŭ ne pagis la ĉijaran membro-kotizon, ke "jam temp' està", kaj ke, kaze de troa malfruo, oni riskas ne plu ricevi ĉi informilon! Ĉu vere vi volas vin elmeti al bedaŭrinda kazo perdi la eblon ĝin tralegi kaj esti informitaj pri la okazaĵoj tra la tuta mondo? Mi ne povas kredi, tial hastu, rapide pagi, ĉu per poŝtĉekkonto (N° 10834349) ĉu per kontanta mono, dum vizito, marda aŭ vendreda, de VIA TEA. Atentu, ke ekde la duono de julio ĝis la fino de aŭgusto la sidejo estos fermita. Ni atendas vin ĉiujn por la Somera Festo je 13$^{a}$ de julio, ekde la 20h00.

Ĝis baldaŭ!

*Sincere via Elda*

*TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO invitas la tutmondan samideanaron partopreni en la konkursoj, ĉi-sube prezentitaj. Pri ambaŭaj temoj, estis jam lanĉitaj en pasintaj jaroj, koncernaj konkursoj: pri Kurtofilmoj, en jaro 2006 (premiado okazis februare 2007); pri Kristnasko, en 2005, enkadre de ampleksa aranĝo, proponinta ekspozicion de Kripoj kaj serion da prelegoj pri "LA KRISTNASKA KRIPO, HIERAŬ KAJ HODIAŬ". Tiam la konkursintoj reprezentis 6 diversajn landojn. Nia celo ĉijara estas almenaŭ duobligi tiun nombron. Helpu nin propagandi tutmonden ĉi tiun informon, por tiele kontribui al efika prezentado de nia lingvo, en neesperantistaj medioj, havanta, ankoraŭfoje, la rolon de taŭga komunikilo kaj diskonigilo de diversnaciaj kulturoj.*

# Kurta KinoEsperanto Festivalo

TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO lanĉas la duan internacian konkurson pri kurtfilmoj, je libervola temo, ital- kaj/aŭ esperant-lingvaj, aŭ alilingvaj sed kun surskribaĵoj en la itala aŭ esperanta lingvoj. La kurtfilmoj povas esti ankaŭ senparolaj.

**Arta Direktoro: Giampaolo COLONI**
**Prezidanto de la Organiza Komitato: Edvige ACKERMANN**

La verko, sendota al la konkurso, **ne estu jam prezentita** en aliaj similaj aranĝoj, tial **la aŭtoro subskribu oficialan deklaron tiusence**.

La kurtfilmo devas esti en formo de DVD aŭ VHS kaj ne superu 15-minutan daŭron. Ĝi **NE** estos redonita.

La aŭtoro sendu poŝte sian verkon ĝis la 15ª de decembro 2007, al la ĉi-suba adreso:

**ESPERANTO TRIESTE**
**C.P. 601 Trieste Centro**
**IT-34101 TRIESTE – ITALIA**

kune kun la sekvaj informoj:

- vivpriskribo kun aldonita malgranda foto de la aŭtoro;
- mallonga resumo de la kurtfilmo, kelkaj fotoj, ties titolo kaj genro, kiu estos elektita inter la sekvaj: *kultura-didaktika-dokumenta, komika, komedia, drama, detektiva, fabela, folklora, muzika, filozofia*;
- nomoj de la roluloj kaj de la aliaj aŭtoroj aŭ personoj iel kunlaborintaj en la filma realigado.

Eblas sendi ankaŭ kurtfilmojn jam prezentitajn en similaj aranĝoj, sed tiuj ĉi estos EKSTERKONKURSAJ.

***Atentu: estas absolute malpermesataj pornokurtfilmoj kaj tiuj kun perfortaj scenoj-temoj.***

Ĉiuj alvenintaj verkoj estos prezentataj al publiko okaze de la SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO - 18-25/02/2008, dum kelkaj vesperoj je senpaga eniro.

La ĉeestonta publiko voĉdonos la plej bonajn verkojn kaj al tiu voĉdono, sumiĝos tiu de 5-persona ĵurio, kies nomojn oni diskonigos baldaŭ.

La kurtfilmoj, klasifikiĝintaj inter la unuaj tri, ricevos premion en formo de pokalo, plato, libroj, krome per projekciado de la verko en interreto kaj similaj kinejaj ĉenoj. La decidoj de la ĵurio kaj de la publiko estas nepriapelacieblaj.

Pliaj informoj ĉe: nored@tele2.it kaj www.blog.ialweb.it/esperantotrieste/



# Kristnasko: mia bildo pri ĝi

## 2ª Internacia Konkurso 2007

Estas invitataj partopreni geknaboj el la tuta mondo, kun aĝo de 6 ĝis 14 jaroj, kiuj sendu, ĝis la **15ª de oktobro 2007**, siajn faritaĵojn al la jena adreso:

**ESPERANTO TRIESTE**
**CP 601 Trieste Centro**
**IT-34101 TRIESTE - ITALIA**

Oni rajtas kontribui per unu aŭ pli da faritaĵoj, pri la supre indikita temo, en la kategorio:

**1)** desegnaĵo (ekz.: "kiel mi imagas tiun tradician feston", "kiel mi rilatas al ĝi");
**2)** rakonto, maksimume unu A4-formata folio (ekz: kiamaniere oni festas ĝin en mia familio, miaj pensoj pri tiu kristana festo, pri la kristnaskaj tradicioj en mia lando, regiono, urbo…, malgranda rakonto pri kripo, pri la naskiĝo de Jesuo, kristnaska fabelo, …);
**3)** manfaritaĵo (el gipso, ligno, metalo aŭ el papero, aŭ el iu ajn alia materialo).

La ĵurio atribuos al Kat. 2 aldonajn 5 poentojn por favori la partoprenon en tiu ĉi branĉo.

La "rakonto" estu en la internacia lingvo Esperanto kaj en la gepatra lingvo de la aŭtoro, kaj ĉiuj aliaj faritaĵoj estu akompanataj de frazo aŭ komentario en ambaŭ lingvoj.

Por ĉiu verko estu ankaŭ indikitaj/aldonitaj:

- persona kaj familia nomoj;
- malgranda foto de la aŭtor(in)o;
- aĝo;
- lernejo kaj klaso;
- poŝta adreso.

Ĉiuj konkursaĵoj estos ekspoziciataj en publika ejo, dum la kristnaska periodo 2007. La vizitontoj donos poentojn al la plej bela verko el la tri kategorioj, kaj tiuj ĉi aldoniĝos al la poentaro de la ĵurio.

Oni anoncos la premiitojn, laŭ kategorio kaj aĝo (de 6 ĝis 8 jaroj; de 9 ĝis 11 jaroj; de 12 ĝis 14 jaroj) enkadre de publika ceremonio en Trieste.

Por kromaj detaloj/informoj:

Rete: noredv@tele2.it aŭ testudo@adriacom.it

Poŝte: vidu la supran adreson.

# Karstaj Tagoj 2007

Organize de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

## Aŭtuno: 1 - 4/11/2007

**Programo provizora**

**Mardon la 1an de novembro:**

Alveno de partoprenantoj, prezentado de Karsto kaj ĝiaj grotoj per diapozitivoj, vespermanĝo kaj nokta promenado tra la urbo.

**En la tagoj 2-3-4 de novembro:**

→ vizito de Kastelo de *Duino*, pieda promenado laŭlonge Padon *Rilke* (kelkajn detalojn vd. ĉi sube);
→ vizito de la urbocentro kaj Muzeo "Speleovivarium";
→ speleologia ekskurso en Karstaj kavernoj;
→ pieda ekskurso tra karsta valo nomata *Val Rosandra*;
→ pieda promenado en mirinda karsta naturo;
→ gastronomia itinero inter Karsto kaj maro.

**Sabaton la 4an de novembro** - post tagmanĝo, lasta tostado, salutoj kaj ĝis revidoj!

Eblas plilongigi la restadon, anoncante propran intencon en la aliĝilo mem.

Por ricevi informojn, aliĝilon k.a. rete/poŝte, mesaĝu/ skribu al TEA-sekretario (vidu adresojn je paĝo 2a aŭ 4a)

### Pado Rilke

Ĝi estas natura teraso, 2-kilometrojn longa, alrigardanta la blankajn klifojn de Duino. Ĉi tiu promenado akompanas fore en la tempo, rememoras pri malnovaj historioj, kulturaj kaj literaturaj.

Pado Rilke estas unu el la plej sugestoplenaj promenejoj de la tuta triesta Karsto. Ĝuste ĉi tie la praga poeto *Rainer Maria Rilke*, kiam en 1911-12 gastis ĉe la geprincoj *Thurm und Taxis*, ŝatis paŝi malrapide kaj mediteme. Sufiĉas legi la "Duinajn Elegiojn" por retrovi tiun neforviŝeblan spuron pri la magia fascino de ĉi karsta roka bordo, la blanka klifaro kiu sin ĵetas en la maron.

Jam komence de la promenado, la rigardo libere vagadas inter la mara kaj ĉiela bluoj, la verdo de la pinoj kaj la blanko de la rokoj, sur kiuj majeste staras la princa kastelo. Rimarkeblas la kontrasto sed samtempe la intima unuiĝo de la dolĉeco mediteranea kun la sorĉema kruteco de karsta medio.

Turmentitaj de vento kaj akvo, kalkaj rokaĵoj siluetiĝas kontraŭ la marbordo: magiaj manoj skulptis la turojn, eble loĝatajn de fantomoj, kiuj ŝajnas, de momento al momento, abrupte disrompi tiun ligon kun la patrina tero, por plonĝi en la maro.

En tiu ĉi aparta medio eblas renkonti multvariecajn plantojn, kiuj alternas sin kun tiuj tipe mediteraneaj, kiaj ilekso kaj sovaĝa olivarbo, kaj la tre karakterizaj lokaj kverkoj. Oni povos vidi, kiel floroj kaj aliaj kreskaĵetoj eliĝas el rokaj truoj, elbroditaj de vento kaj akvo: naturo kapablas ĉiam trovi sian elirvojon!

Laŭ la pada longo vi malkovros la diversajn vizaĝojn, ĝuste por vi surscenigitajn, de la magia Karsto. Do, nia amika konsilo estas nepre meti en vian valizon la fotoaparaton… certe iun belan memoraĵon pri ĉio ĉi vi kunportos viahejmen!

Kaj kompreneble taŭgajn ŝuojn, por paŝi sur ŝtona tereno! Do, ni atendas vin tre amike por malkaŝi al vi ĉiuj la belaĵojn de Triesto kaj ties ĉirkaŭaĵoj! Bonvenon!

## 10 minutoj pri Esperanto en la itala ŝtata televido

**Ranieri Clerici**, vicprezidanto de la ITALA ESPERANTO FEDERACIO estis intervjuita pri Esperanto ĉe la ĉefa kanalo de RAI, la itala ŝtata televido.

La 10-minutan intervjuon oni dissendis la 11an de majo, sed ĝi videblas kaj - kompreneble! - vidindas nun ankaŭ en la reto (http://tinyurl.com/3x7lw). En la itallingva prezento Clerici sukcesis tuŝi multajn facetojn de la internacia lingvo. Inter alie li parolis pri Esperanto kiel solvo por pluraj problemoj, solvo por la komunikaj problemoj, la lingva malegaleco, ekzemple ĉe la Eŭropa Parlamento. Li substrekis ke ĝi utilas ankaŭ por la konservado de aliaj lingvoj kaj disvastigado de tutmonda kulturo. En la intervjuo li pritraktis ankaŭ la lernfacilecon kaj logikecon de la lingvo, pro kiuj ĝin eĉ infanoj povas facile alpropriĝi.

Por pruvi ke Esperanto taŭgas ankaŭ en literatura kampo, la FEI-vicprezidanto laŭtlegis en la itala kaj Esperanto fragmenton el la fama verko LA DIA KOMEDIO, de *Dante Alighieri*. Tiukaze li reliefigis, ke, inter multaj alilingvaj tradukoj de tiu verko, nur malmultaj estas tradukitaj en tercinoj, la originala metriko de *Dante*. Fine de la intervjuo li parolis pri la DVD **Esperanto Elektronike**, per kiu oni povas akiri multflankajn kaj riĉajn pliajn informojn pri Esperanto.

Bonega kaj eleganta prezentado de nia lingvo!



**Rat-Man**, la plej granda heroo vivanta de MARVEL[1)], baldaŭ parolos Esperanton: en ĉi pasintaj semajnoj, ITALA ESPERANTISTA JUNULARO kaj JUNULARA ESPERANTISTA FRANCA ORGANIZO decidis kunlabori cele al produktado kaj distribuado de bildstria libreto esperantlingva.

**Rat-Man**, kreita de la genimensa *Leonardo Ortolani*, estas unu el la plej grandaj sukcesoj de ĉi lastaj jaroj en la komiksa kampo.

Malgranda/granda super-antiheroo, parodio de aliaj bildstriaj protagonistoj, pro naiveco kaj stulteco baraktas en situacioj ĉiam komikaj kaj, plej ofte, absurde paradoksaj. La eldonaĵo enhavos unu aŭ pli da historioj de **Rat-Man** tradukitaj al Esperanto, unu malgrandan historieton omaĝe al **Rat-Homo** kaj iujn informojn pri la Lingvo Internacia: jen bonega okazo por riĉigi propran komiks-kolekton, por ridi en Esperanto, por uzi kiel studilon por gelernantoj aŭ kiel donacon por komiksema amiko.

La proksimuma kosto de la verko estos 5-6 €.

Por realigado de la projekto, oni serĉas volontulojn pri jenaj taskoj:

★ traduko de tekstoj, de itala al Esperanta;
★ enskribado de vortoj en la bildaj kadroj;
★ fina kontrolo de la tekstoj.

Interesitoj kontaktu *romeo@pecorElettriche.it*. Pliajn informojn oni povos trovi ĉe la paĝoj de projekto RoMeo, ttt-ejo://www.pecorelettriche.it/esperanto/RoMeo/default.asp

1) Kio estas MARVEL? MARVEL estas la plej granda eldonejo pri komiksoj, kun sidejo en New Jork, fama pro herooj kiaj la Araneo-Homo, X-homoj, Hulk-o, Silfer Surfer kaj aliaj. Por pliaj, anglalingvaj, informoj, vidu ĉe la ttt-ejo: www.marvel.com



## Nekutima Telefonalvoko

*de Ergoto de Bonaero*

Vekis min telefonsonorado; mi sakris pri kiu komponis la numeron de mia telefono, ellitiĝis kaj prenis la ricevilon.

- Estas la tria horo matene - iu diris.

- Mi tion scias, idioto! - mi kriis - Kiu estas tiel sprita por telefoni je ĉi horo?

- Mi - respondis la ulo -, sed idioto mi ne estas. Idioto mi estus, se mi telefonus al vi je la sepa, por diri ke je tiu horo estas la tria.

- Ĉu mi havas la rajton scii pri kia blago temas?

- Mi povas aserti ke ne temas pri blago - diris la ulo - Mi diris al vi ke estas la tria matene, kaj tiel estas.

- Tute ne interesas min ke estas la tria! Mi ne pensas ellitiĝi!

- Ĉu vi ne pensas ellitiĝi? Ĉu vi do parolas en la lito?

- Mi ne parolas en la lito! Mi parolas en la televidĉambro, kaj mi devis ellitiĝi por respondi vian stultan vokon!

- Vi - milde diris la ulo - ĵus diris ke vi ne pensas ellitiĝi je ĉi horo. Tamen vi forlasis la liton. Ĉu vi povas klarigi tion?

- Nu, fakte - mi grumblis iom konfuzite -, mi ne pensis ellitiĝi. Sed, kial vi vokas je la tria matene por diri al mi ke estas la tria?

- Ĉu vi pretendas ke mi voku tagmeze por diri ke estas la tria? Ĉu vi volas transformi min en hipokritan ŝajnigeman friponon? Sciu ke mi estas kaj daŭre estos ĝismorte, homo honesta, serioza kaj verama.

- Mi pensas transformi neniun - mi flustris -, kaj mi ne dubas pri via honesteco. Kaj ĉar mi povis taksi ke vi estas afabla kaj ĝentila homo, mi estonte konsideros vin kiel bonan amikon. Kaj vi ne neos peton al amiko, ĉu ne?

- Mi akceptas vian amikecon. Kaj kompreneble, mi neniam neas peton al amiko!

- Bone. Jen mia peto, neniam plu, bonvolu kompreni ĝin, neniam plu telefonvoku min je la tria matene.

- Neniam plu mi telefonvokos vin je la tria matene! - diris la ulo - Mi ĵuras pro la honoro!

Kaj post diversaj asertoj de amikeco, li finis la interparoladon. Mi reiris en la liton kaj profunde endormiĝis denove. Sed vekis min la telefonsonorilo. Mi leviĝis, iris en la televidĉambron, levis la ricevilon, kaj aŭdis la voĉon de la sama ulo kiu diris:

- Estas la kvara!

---

*Ergoto de Bonaero, plumnomo de Adam Hrinkiewicz, naskiĝis en Buenos Aires en la jaro 1931. Li lernis esperanton en 1959 kaj verkis diversajn librojn esperante kaj hispane. Por la instruado de Esperanto li kreis la kursojn "¿Habla Usted Esperanto?" kaj "Curso Relámpago de Esperanto" kaj verkis tre gravan vortaron "Laŭtema Vortaro", uzante la anglan, hispanan, francan kaj internacian lingvojn en la sama vortaro. Krom pluraj libroj, li verkis ankaŭ en revuoj kiel* KARUSELO, THE BRITISH ESPERANTIST *kaj* LA TORNISTRO. *En 1970 li gajnis la premion "Nova Talento" en la Belartaj Konkursoj de UEA.*

## VOJAĜI

«La mondo estas la domo de l' homaro», kantas *Tagore*.

Neniam kiel dum ĉi tiuj jaroj, pro amasa turismo kaj tutmondiĝo, tiel veras la aserto de l' granda hinda poeto.

Sed, "bone" vojaĝi signifas ankaŭ esti kulturcele konsciaj, pretaj renkontiĝi kun aliaj, malsamaj ol ni, kun plej diversaj kutimoj, nekonataj moroj, diferencaj manĝaĵoj.

En sia eseo DE AMERICA, la verkisto *Piovene* rimarkigis ke «vojaĝi devus esti ago de humileco», nome forhejmiĝi nur kiam iu deziro lerni puŝas nin.

Kontakto kun tute malsamaj civilizoj, ĉiam estas mensa kaj spirita riĉigfonto. Krome la senfinaj variecoj de la cikloj, teroj kaj maroj, kapablas doni al ni emociojn de sublima beleco.

Ĉie ajn troviĝas la belo, kaj la manifestiĝoj de l' civilizacio loĝas ĝuste tie, kie historio lasis siajn spurojn. Ni pensu pri la temploj *Maya* sur Andoj, la barkopopolo en la ĉina maro, aŭ, pli proksime al ni, en Italio, la "Ŝtonoj" de *Matera* aŭ la "Nuragoj" videblaj en Sardinio.

Kaj la Psalmo 113 tiel diras:

> «La ĉieloj estas la ĉieloj de l'Sinjoro,
> sed la teron Li donis al la homaj idoj»

ne nur por ke ĝi estu kultivata, sed por ke ĝi fariĝu objekto de ilia miro, de ilia talento.

Vojaĝante, la homo sin levas super sian etanimecon por malkovri la allogon de nekonataĵo.

Kaj renkontiĝante kun la aliulo, li pliriĉiĝas, laŭ siaj volo kaj komprenemo de liaj pensoj, pasioj, revoj.

Sed nur neŭtrala lingvo – kia Esperanto – sukcesos ekirigi tiun dialogon, unikan, intiman kaj taŭgan por reciproka interkompreniĝo...

... kaj amo reciproka.

*VIGLO*

### Fotemuloj, asociiĝu!

Delegito de UEA en Ĉinio kaj aktiva esperantisto, mi planas unuigi la esperantistojn, kiuj interesiĝas pri fotado kaj fondi Internacian Esperantistan Foto-Asocion. Kontaktu min! Sun Minĝiao <semio@163.com>

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Redaktanto**: Elda DOERFLER
**Sidejo**: Via Coroneo 15 - 34133 Trieste
**Poŝtelefonoj:** (0039) 3314805706; 3392226936
**Reto**: esperantotrieste@adriacom.it; noredv@tele2.it
**Grupa ttt-ejo:**//it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantista triestina
**aŭ** ://www.esperanto.it/trieste/
**Poŝta adreso**: CP 601 Trieste Centro IT-34101 Trieste - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349

## Julia Programo

| | |
|---|---|
| 03 - mardo | 20h00 - Esploroj en TEA-arkivo |
| 06 - vendredo | 20h00 - ESPERANTAĴOJ, zorge de Elena Zerpini |
| 10 - mardo | 20h00 - Esploroj en TEA-arkivo |
| 13 - vendredo | 20h00 - SOMERA FESTO: picoj, glaciaĵoj kaj…! La koruso VERDAJ ANĜELOJ plezurigos nin belkantante! Venu por reciproka saluto antaŭ via forvojaĝo por partopreni en diversaj esperantaj eventoj tra la tuta mondo! |



**Fermo de la asocia sidejo ekde la 16ª de julio ĝis la 31ª de aŭgusto!**

Ni revidos nin je la 1ª de septembro, por reaktivadi kaj komenci propagandon pri kursoj, per tute novaj, ĵus bakitaj, reklamiloj, kiuj - ni ĉiuj estos engaĝitaj en tiu ĉi laboro! - estos disdonataj tra la urbo, proponataj al vendejoj, kulturaj asocioj, informadaj ejoj kaj aliaj: kiel eble plej nombre ni klopodos ilin dissemadi ie ajn!

**Feliĉan somerumadon al ĉiuj!**

### Lingvo kaj Dialekto

*Popolo*
*strikte katenita,*
*je ĉio senigita,*
*premŝtopita ties buŝo,*
*estas ankoraŭ libera.*

*De popolo*
*forprenu laboron*
*pasporton*
*tablon kie manĝi*
*liton kie dormi:*
*ankoraŭ ĝi riĉas.*

*Popolo*
*malriĉa kaj sklava fariĝas*
*kiam forŝtelita estas ĝia lingvo*
*herede ricevita de l' praavoj:*
*pereas ĝi por ĉiam.*

Ignazio BUTTITA - sicilia poeto

# Ludoj, ŝercoj, enigmoj…

**La piron kiun mi manĝis**

**Je l' komenco ĝi ja malmola,**
**Sed je l' mezo iom malpli,**
**Kvankam, ĉefe je la fino,**
**Tre matura ŝajnis ĝi al mi!**






*VIGLO*

*Solvo de la ludoj aperintaj*
*en la maja-junia TEA-Bulteno:*
***Deviga edziĝo: la noktoĉemizo***
***La rabviktimo: la halto-indikilo***



**Flirtanta papilio**
**Milmaniere ĝi aspektas**
**jen bona, jen brila,**
**eĉ stranga, fiksa**
**fojfoje kaj falsa,**
**sed plej ofte mirinda.**
**Pro tio ĝi min**
**entuziasmigas!**

**Ruzrabeno** Rabeno kaj pastro veturas en la rapidvojo, ĉiu per sia aŭto. Okazas akcidento: ambaŭ aŭtomobiloj karambolis kaj preskaŭ plene detruiĝis. Sed la du Di-servantoj saviĝis. Ili eliras, staras kune ĉe la vojrando kaj trovas ke nenio okazis al ili.



La rabeno rigardas la alian homon kaj diras: "Vi estas pastro, ĉu ne?"



"Jes", respondas la pastro.
Rabeno: "Okazis al ni vera miraklo. Certe la Eternulo deziris ke ni renkontiĝu kaj fariĝu amikoj".
Pastro: "Povas esti".
Rabeno: "Mi opinias ke ni devas tosti pro nia saviĝo kaj je nia nova amikiĝo. Mi havas hazarde botelon da vino. Espereble ĝi ne estis detruita. Ĉu vi pretas trinki kun mi?"
Pastro: "Kial ne?"
La rabeno alportas el la veturila kofro bonstatan vinbotelon kaj ofertas al la pastro. Tiu ĉi trinkas iomete sed, sekve de instigoj de la rabeno, li poste pli kaj pli drinkas. Sed la rabeno tute ne drinkas.
Pastro: "Kial vi ankaŭ ne drinkas ?"
Rabeno: **"Mi preferas unue atendi la policon.**"

**"Sekvo de la klimata ŝanĝo estos altiĝo de marnivelo, agrikulturo kolaps…"**

**"...kaj la prezoj por biero multe kreskos!"**



**Alarmiga informo pri klimato-ŝanĝiĝo**

*Sendita de R. Burmeister (Germanio)*

**Nekompareble**



Rabeno ĉagreniĝas pro tio, ke tiom da preĝantoj venas en la sinagogon sen kapkovraĵo.
Do, li skribas ĉe la enirejo: "Eniri la sinagogon sen ĉapo estas sama peko kiel adulto."
La sekvan tagon aperis sub ĝi la jena skribo, kiun aldonis unu el la komunumanoj:
"Mi provis. Nenia komparo!"

*(Fonto: la retlisto de amantoj de judaj humoraĵoj Rido sanigas!)*

# Notoj

# Mi devas rememori ke...

1) **post somerumado, je la 1ª de septembro 2007 oni atendas min ĉe TEA-sidejo ekde la 19ª horo.**

2) ekde… tiam startos propaganda kampanjo pri kursoj de Esperanto: mi promesis mian helpon, disdonante varbilojn!

3)

4)